Wilhelm Müller,

Printempo de l' amo

tradukita de Manfred Retzlaff

Furiozas jen la vintro
Kaj la florojn fleksrompitajn
Pentras moke ĉe l' fenestroj
Li al mi en palaj bildoj.
Ŝtormu, vintro kaj bruadu!
Tamen vi min ne tremigos,
Ĉar el fund' de mia koro
La printempon mi ekigas,
Kiun neĝ' ne povos kovri
Kaj glaci' ne rigidigos,
La printempon, kies suno
La okul' de l' karulino,
La aero spiro ŝia,
Kies rozoj ŝiaj lipoj,
Kaj alaŭde ŝvebas mi jen
Super ĝi kun miaj kantoj.

Traduko de la Germana poemo "Frühling der Liebe" de Wilhelm Müller *(∗1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2013-03-07.*

Arg-857-1728 (2013-03-14 14:45:33)